

La Riverego kebekia esperantista bulteno

Septembro 2007

Esperanto-Societo Kebekia

Jaro 22, No 89

Kebekia forumo socia

Normand Fleury

Le 1^{er} Forum social québécois s'est tenu à l'UQÀM à Montréal en août dernier et a réuni des centaines d'organisations et des milliers de participants. Un immense succès, une organisation impeccable et une grande visibilité pour le mouvement espérantophone grâce à la participation des membres du Club Espéranto-UQÀM en collaboration avec la SQE. Nous avons un très beau kiosque durant les deux jours et une immense banderole (L'espéranto, l'autre langue) durant la manifestation de clôture du forum.

La unua kebekia socia forumo okazis fine de aŭgusto 2007 en la Kebekia universitato en Montrealo (UQÀM). La UQÀM-Esperanto-klubo, kunlabore kun ESK-o, aktive partoprenis dum la tritaga evento. Fakte temis pri granda forumo kun partopreno de plurmiloj da homoj kaj plurcentoj da asocioj plej diversaj el politika, laborista, sindikata, religia, sociekonomia, socia, ekologia (ktp) medioj.

Oni povas paroli pri bunta programo kiam okazas samtempe

pli ol 30 programeroj kiel prelegoj, laborgrupoj, diskutrondoj, debatoj kaj tiel plu. Mi gvidis duhoran diskuton pri la temo *Kiu lingvo por la alternativa movado?* kun partopreno de 12 personoj. (Vidu aparte la raporton, senditan al la organizantoj de la forumo.)

Ni nepre devas provi pli

***ofte ligi la Esperanto-
movadon kun la alisocia
movado ĉar tiu movado
sintene similas al ni.***

Danke al la partopreno de kelkaj Esperanto-UQÀM-anoj estis bonega budo pri *La Esperanto, la alia lingvo*. Mondmapo kun informoj pri malaperintaj lingvoj staris panele apud afiŝoj kaj table estis informoj pri la avantaĝoj de Esperanto kiel egaleca komunikilo por la alisocia movado.

Ni estis du aŭ tri deĵorantoj ĉe la budo kiuj respondis al multaj interesitoj kaj al plej diversaj

demandoj pri Esperanto. Mi eĉ diru ke estis facile informi pri Esperanto ĉar homoj kiuj venis al nia budo ofte entuziasme aŭskustis, miris pri la eblecoj de la monda lingvo kaj favoris la ideon de neŭtrala lingvo. Ni nepre devas provi pli ofte ligi la Esperantomovadon kun la alisocia movado ĉar tiu movado sintene similas al ni.

Dimanĉe okazis manifestacio kaj ni havis grandan banderolon kun la sama slogano *espéranto, l'autre langue* kaj ni disdonis centojn da paperaj slipetoj kun la demando *Kiu lingvo por la alternativa movado?*

Fine mi ŝatus danki al Magnolia, Valérie, Zdravka, Yan, Sylvain, Jérôme-Frédéric, Cora, Edmond kaj aparte speciale al Boris kiuj helpis dum la forumo. Via helpo estis tre grava kaj ni sukcesis bone kaj bele prezenti Esperanton danke al vi.

Financaj rezultoj

Sylvain Auclair, kasisto

Kiel ĉiujn jarojn, mi verkas tiun ĉi artikoleton pri la financa situacio de nia Societo. Mi certas ke, alie, se mi maltrafus tiun rendevuon, mi ricevus dekojn da kritikaj retleteroj...

Nu, nia Societo plu iras sian vojeton, sen tro multaj problemoj, sed al horizonto, kiun mi vidas iom malluma (sed kasistoj devas esti pesimistaj; tio estas parto de l'taskodifino). Kvankam la jaro finiĝinta en ĵusa majo montris profiton (je 277 \$), male de la antaŭa jaro, tiun ŝanĝon ni ŝuldas grandparte al subvencio de KEA (por la pretigo de informfolioj) kaj al la malpliigo de niaj kostoj rilataj al informado (de 700\$ al nulo — la prisubvenciata informfolio aperis antaŭ pli ol jaro) kaj rilataj al eldono de periodaĵoj, *La Riverego* kaj *Le Monde de l'Espéranto*.

Sed tio NE estas bona novaĵo. Tiuj kostoj malpliĝas ĉar malkreskas nia membraro. Niaj membrokotizoj sumis en 2006-07 nur 645 \$-jn, kompare kun 866 \$ dum la antaŭa jaro. Asocio estas siaj membroj; sen membroj, ĝi ne plus ekzistas.

Ciferoj: rimedoj sumis 1734 \$-jn. Ĉefaj inter la rimedoj troviĝas la membrokotizoj (645 \$), la abonkotizoj al *Le Monde de l'Espéranto* (416 \$), subvencio de KEA (244 \$) kaj donacoj (101 \$). Escepte ĉi-jare, ni ricevis partan repagon de la pagitaj vendimpostoj dum la tri antaŭaj jaroj, sume je 184 \$.

Kostoj sumis je 1456 \$. Eshtarit abonoj al *Le Monde...*, (376 \$), pago de la TTT-gastigado (253 \$, sed ni antaŭpagis por kelkaj jaroj),

La Riverego (324 \$) kaj diversaj oficejaj kostoj (284 \$).

Ni akceptis plian dumvivan membron, sed tio ne vidiĝas en la rimedoj, ĉar ni tenas tiajn kotizojn en rezervo, kiu nun sumas 1659 \$-jn.

Krom la mono (5953 \$), nia ĉefa aktivo estas la (iam, espereble...) vendotajekzempleroj de *Nanatisis*: 137 ekzempleroj valoraj po dek dolarojn.

Ni ne havas *verajn* ŝuldojn, ekster la jam menciita rezervo por dumvivaj membroj kaj 254 \$-jn, kiujn ni tenas por eventuale restarigota junulara asocio...



**Société québécoise d'espéranto
Esperanto-Societo Kebekia**

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux : Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise avec mention obligatoire de la source. Photocopié à 90 exemplaires. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto. Rédaction : Jérôme Frédéric Bouchard (jero@esperanto.qc.ca). Administrateurs de la SQE : Normand Fleury (président), Martin Benoit (vice-président), Boris-Antoine Legault (secrétaire), Sylvain Auclair (trésorier) et Yan Levasseur (conseiller) .

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junio, septembro kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Fotokopiita 90oble. Senpage por la membroj de la ESK. Por la aliaj, la jara abono kostas 10 kanadajn dolarojn. UEA-kodo de la Societo : kebk-d. Redaktado: Jérôme Frédéric Bouchard (jero@esperanto.qc.ca). Estraranoj de ESK : Normand Fleury (prezidanto), Martin Benoit (viceprezidanto), Boris-Antoine Legault (secrétaire), Sylvain Auclair (kasisto) kaj Yan Levasseur (konsilanto).

Échéance pour le prochain numéro / *Limdato por la venonta eldono* : 2007.12.01

6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8 • informo@esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca

Grandaj foto-retejoj ekuzos Esperanton

Leo De Cooman

Antaŭ kelkaj tagoj mi Esperantigis la terminojn de la fotoretejo Panoramio.

<http://www.panoramio.com>

En kiu Esperanto jam estas elektekbla (la lingvelektilo troviĝas tute malsupre dekstre) sed ankoraŭ io mankas en la programo (kaj verŝajne ie kaj tie ankaŭ en miaj tradukoj).

Mi sciigis pri la programeroj kaj atendas korektojn.

Amike salutas.

Germain Pirlot

La granda eŭropa foto-retejo Ipernity.com baldaŭ proponos siajn servojn ankaŭ en Esperanto. La decido estis farita antaŭ kelkaj tagoj, kaj jam en Oktobro oni esperas lanĉi la Esperantlingvan fasadon de la servo.

La Esperantigon de Ipernity iniciatis Paul Peeraerts, kiu kune kun kelkaj aliaj Esperantistoj proteste forlasis la foto-servon Flickr pro ĝia neglekto de homaj rajtoj en Ĉinio.

Krom Esperanto, la servoj de Ipernity laŭ la nunaj planoj estos

haveblaj ne nur en la franca kaj angla, kiel nun, sed ankaŭ en la germana, hispana, portugala kaj itala lingvoj. La multlingveco ne estos nur fasado, sed ankaŭ helpas uzantojn de la servo trovi aliajn fotemulojn, kiuj preferas la saman lingvon.

Male ol en nur-esperantaj retejoj, la Esperantistoj tamen ĉeestos kaj videblos ankaŭ inter la ĝenerala publiko.

Originala literaturo Esperanta

Germain Pirlot

En la jena ttt-ejo troviĝas listoj de aŭtoroj, originalaj romanoj, noveloj/rakontoj, dramoj kaj poemaroj verkitaj originale en Esperanto kaj aperintaj de 1898 ĝis nun, ligitaj al dokumentoj kun pliaj informoj pri aŭtoroj kaj verkoj, inkluzive kelkajn centojn da recenzoj. La tuto formas ampleksan kaj kreskantan datenaron.

Vidu :

<http://esperanto.net/literaturo/>

Karen Pereira

Ni prodktas filmojn originale en Esperanto pere de nia eta entrepreno *Imagu Filmoj*.

Nia unua filmo estas *Gerda Malaperis*. Ĝi estas longdaŭra (1 horo kaj 45 minutoj). Ĝi estas bazita sur la samnoma libro de la fama verkisto Claude Piron. Ni lanĉis ĝin lastjare dum UK en Italio. Ĝi estas parolata en Esperanto, kaj la DVD enhavas subtekstojn en 7 lingvoj.

Imagu filmoj

Ĉi jare ni ĵus lanĉas «La Patro». Ĝi estas mezdaŭra filmo (40 minutoj). Ĝi estas bazita en la japana literaturo, el verko de Kikuti Kan. Parolata en Esperanto, la DVD enhavas subtekstojn en 13 lingvoj

Jen la ligilo de nia pagxaro por ke vi iom pli konu pri nia laboro : www.imagu.com.br

Notu ke tiuj filmoj aĉeteblas pere de la Libroservo (vidu ĉe www.esperanto.qc.ca)...

Bienvenue à ARE 2007

Normand Fleury

Nous vous invitons à participer à la 14^e rencontre automnale d'espéranto à Silver Bay au Lac George (NY) durant le congé de l'Action de Grâce (6 au 8 octobre). Au programme: des cours pour débutants, des conférences diverses, des jeux de société, du plein air, une soirée culturelle et bien plus. Voir le site web suivant pour plus d'information et vous inscrire : www.esperanto.qc.ca/fr/are

Bonvenon al ARE 2007

Normand Fleury

Jen la 14^a jaro ke la Esperantistoj el nord-orienta parto de Norda Ameriko amike kunvenas por praktike uzi Esperanton. Por la tria jaro, ARE okazos en Silvero apud la bela Georga lago en NovJorkio. Invitu ankaŭ viajn geamikojn se ili interesiĝas pri rapida kurso dum semajnfino. La programo estas varia kaj krom la prelegoj, okazos ludoj, eksteraj sportaj aktivecoj kaj multe pli. Enskribiĝu ĉe: www.esperanto.qc.ca/eo/are

334 koreaj gestudentoj eklernas Esperanton

Lee Jung-Kee

En la dua semestro de koreaj universitatoj, 334 gestudentoj aliĝis al la kursoj de Esperanto, kiuj komenciĝis de aprilo en la universitatoj Korea fremdlingva (Seulo kaj Yongin), Dankook (Seulo kaj Chonan) kaj Wonkwang (Iksan).

La aliĝintaj studentoj lernos Esperanton dum 16 semajnoj po du horoj semajne kaj ili gajnos du notojn oficiale.

La studentoj de tempo al tempo provos paroli Esperante kun nekoreaj esperantistoj en Skajpo, reta komunikilo dum lecionoj. Via bonvola reago donos grandan motivon al la studentoj.

Jen estas Skajpo-adreso de la docento Lee Jung-kee, kiu instruas en tri universitatoj (Docento Ma Young-tae gvidas en Korea fremdlingva univ. en la kampuso Yongin).

Skajpo-adreso : leejungkee

Retadreso : esperanto@saluton.net

Forum social québécois

Normand Fleury

Jen teksto de la propono, verkita de Edmond Brent kaj Normand Fleury kaj transdonita al la organiza teamo de FSQ.

Voici le texte de la proposition d'action pour construire un Autre Québec, rédigé par Edmond Brent et Normand Fleury au nom du mouvement espérantophone et transmis aux organisateurs du FSQ.

L'espéranto, langue altermondialiste et équitable.

Objectifs de la proposition :
Diffuser la connaissance de

l'espéranto comme solution aux entraves à la communication équitable entre les organisations altermondialistes d'ici et dans le monde.

Description des actions : Renseigner le réseau des associations altermondialistes et écologiques sur la réalité de l'espéranto comme langue sans attachement impérialiste ou politique, répandue dans le monde entier et sur les possibilités de son utilisation comme outil de communication alternatif entre les organisations altermondialistes dans les échanges surtout à

l'extérieur du Québec.

Fournir un éventail des possibilités d'apprentissage de l'espéranto.

Créer des projets de collaboration dans des champs d'intérêt commun entre des organismes qui utilisent déjà l'espéranto et des organismes altermondialistes.



Jean-Claude Bélanger (maldekstre) kaj Normand Fleury dum la Socia Forumo manifestacio

Montrealaj Esperanto-kunvenoj (MEK)

DATO	KIE	HORO	TEMO
ven. 28 ^a sep. 2007	MEDO **	19 h	Ĝenerala kunveno
6-8 ^a okt. 2007	Silvero (Usono)		ARE. Detaloj : vidu ĉe www.esperanto.qc.ca
ven. 26 ^a okt. 2007	MEDO **	19 h	Festoj
ven. 30 ^a nov. 2007	MEDO **	19 h	Teo
sab. 15 ^a dec. 2007	Ejo elektota	18 h	Decembra Festo kaj komuna bufedo
12-18 jul. 2008	Montrealo		Tut-Amerika Kongreso de Esperanto

** **Montreala Esperanto-Domo (MEDO):** 6358-A rue de Bordeaux, Montréal

Entre Papineau et De Lorimier.

Métro Beaubien, Autobus 18 Beaubien Est

Voir le site web pour un plan d'accès : www.esperanto.qc.ca

19 h *Horo por komencantoj, lernado, konversacio, demandoj pri la movado.*

Heure pour les débutants : conversation, questions, grammaire...

20 h *Anoncoj, libera babilado, libro - pruntado kaj - aĉetado, aliĝo al ESK.*

Annonces, emprunt ou achat de livres, de revues, adhésion à la SQE.

20 h 30 *Tema programo, diskuto, kvizo, ludo...*

Programme thématique, discussion, quizz, jeux...

Por komentoj, proponoj, demandoj : informo@esperanto.qc.ca

Kaj?

En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto et un regroupement de club espérantistes. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à riverego@esperanto.qc.ca...

Club d'espéranto de l'UdeM: udem@esperanto.qc.ca Club d'espéranto de l'UQAM: uqam@esperanto.qc.ca

McGill Esperanto Club: mcgill@esperanto.qc.ca

MEMO, Montreala Esperanto-Movado : www.esperanto-montreal.org



Bunta grupo 2007